

JARA RAPORTO de ILEI por 2011

Kompilis/verkis: SMG Inter la 3a ĝis 14a de julio, 2012.

Enkonduko:

La alta pinto de 2011 por ILEI estis klare ĝia konferenco, kun 103 partoprenintoj, kaj la ligita universitata simpozio, kiu atingis nivelon unuafojan por la ligo. Niaj revuoj kaj retejoj raportis amplekse pri la evento, do ni ne ripetas tiujn informojn ĉi tie.

Formale, la jarraporto resumas la farojn de kalendaraj jaro, sed ĉar en Kunmingo la komitato estos petata senŝarĝigi la estraron por la dekdumonata periodo de post la antaŭa konferenco, ni raportas ankaŭ kelkajn informojn pri la unua duono de 2012.

Anekses al ĉi tiu raporto estas:

- Financa raporto pri la kalendaraj jaro 2011
- Laŭlandaj resumoj pri la membraro fine de 2011 kaj nuntempe en 2012.
- La raportoj de la landaj sekcioj por la kalendaraj jaro 2011.

La nuna raporto ne prezentas grandan kvanton da detaligo, ĉar tre la jaro la estraro tre regule raportis progreson al la sekcioj, komitatanoj kaj membroj, ankaŭ al anoj de plej diversaj retgrupoj, ene de ILEI, kaj ekster ĝi. Krome, novaĵoj kaj informoj aperis regule en nia retejo ĉe www.ilei.info; do svarmis ebloj resti informitaj pri la ligo laboro.

Membraro:

La ligo spertis falis de ĉ. 6% en la membraro, kaj perdis sian lastan membron en kvar landoj. La membro-administrado estis tre malfacila tra la unua jaruono, en kiu la ligo ne havis sekretarion. Ĝis la fino de marto 2011 nova membro-administra prizorganto estis trovita en Herzberg, kiu starigis novan registro-sistemon kaj laŭgrade la datumoj estis transigitaj al tiu sistemo. Ekzistas ekde januaro 2012 gvidilo pri la membro-administrado. Parto de la falo en la membronombro estas atribuebla al eksteraj ekonomiaj kondiĉoj, kiuj turmentas ĉiun E-asocion, parto al tiu hiato en la administra prizorgo, kaj parte pro la ligita manko de rimedoj por la necesaj varbaj kaj kampanjoj por interveni en landoj kiuj ne raportis membrojn, aŭ kie la nombro signife falis.

Ciferoj montras, ke la kategorio de ret-membreco ĝuas ĉiam pli da populareco (vidu precizajn procentaĵojn en la membredeklaro por 2012), sed temas grandparte pri ekzistantaj membroj, kiuj ŝanĝas sian kategorion, kaj malofte (krom en Ĉinio) pri altiĝo de novaj membroj. Ĉar la kostoj de pretigo de fizike presata revuo IPR ne tro rekte proporcias al la eldonkvanto, la retmembra kategorio fakte reduktas la kotizan enspezon, sen koresponda falo en la kostoj. Tio portas nin al situacio, kie la kotizaj enspezoj (nia ĉefa enspezofonto) ĉiam malpli povas kovri kostojn pli ol la nuraj rektaj liveroj de servoj al la membraro. Antaŭeniga laboro (t.e. plenumado de la celoj de la ligo) estas farebla nur per deficitaj buĝetado.

Niaj forpasintoj

Eugeno Perevertajlo, Uzbekistano: Feb 2012 (IPR 2012/2, p 40)

Peter Rados, Hungario, 2011

Otto Haszpra, Hungario, Apr 2012 (IPR 2012/2, p 39)

Johano Kirsch, Hungario, Marto 2012.

Josef Semer, Israelo, Marto 2012 (IPR 2012/2, p 38)

Bonvolu helpi al ni kompletigi la liston.

Sekcioj:

La komitato en Kopenhago nuligis la aliĝintecon de tri sekcioj, kiuj tra kelkaj jaroj ne anoncis la minimumon de kvin membroj – en Britio, Rusio kaj Irano. En Kopenhago anoncis sin homoj pretaj restarigi la britan sekcion, sed vanis ĉiu klopodo transformi tion en konkretan rezulton – ekzemple la nomigon de nova reprezentanto. Same en Rusio, ekzistas kerno da membroj kaj deziranto ene de REU kunigi ilin en novan sekcion, sed manko de rimedoj ĉe ILEI kontinue sekvi kaj kuraĝigi la refondon, signifas denove nula rezulto. Feliĉe, la Komitato povis en Kopenhago akcepti unu novan sekcion, en Meksiko.

ILEI sekvas plurajn kuraĝigajn evoluojn en Azio, tiel ke imageblas aliĝpetoj ĉu de Nepalo, Mongolio aŭ Vjetnamio. Kontaktoj okazis por kuraĝigi aliĝpetojn el Armenio kaj Kongo DR.

En la jaro 2011, ni aldonis reprezentantojn en Ganao, Kongo DR kaj Israelo, kaj kontaktpersonojn en Bolivio, Haitio, Indonezio, Kenjo, Nepalo kaj Urugvajo.

Restas por nomumi reprezentanton en Argentino (kie okazos UK en 2014, kaj kie agado abundas), Kolombio, Venezuelo, Ĉilio, Slovakio, Slovenio, Senegalo kaj pluraj pliaj landoj.

Nova agema aktivulo sur la tereno pri varbado de sekcioj kaj reprezentantoj relative facile rikoltus bonajn atingojn tra deko da landoj.

Komitato:

La komitato kunsidis en Kopenhago kun kontentiga nombro da komitatanoj (32). La protokoloj de tiuj kunsidoj aperis en nia retejo baldaŭ post la kunsidoj. Ĝi akceptis multajn modifojn al nia Interna Regularo kaj kelkajn al nia Statuto. La uzado de retaj voĉdonoj intensiĝis en 2011, post ilia starigo meze de 2010. Ekde aprilo 2011 kaj nun, la komitato decidis 26 aferojn per reta voĉdonado en kvin voĉdon-sesioj. Vidu la apartan liston por tagorda punkto 6..

Ekzamenoj:

Ne en la disponebla tempo troveblas tre verŝajne alveninta raporto; pri la ekzamenoj de ILEI-UEA povos raportii Mirejo Grosjean surloke. Pri la KER ekzamenoj eblas abunde informiĝi pere de <edukado.net>.

Instruista trejnado:

En septembro nova tri-jara kurso estis sukcese lanĉita en Universitato Adam Mickiewicz en Poznano, el kiuj kvar ricevas stipendiojn de UEA kaj ILEI, kun eblo specialiĝi pri instruado en la tria studjaro. Bedaŭrinde, devis veni al fino la unu-jaraj kursoj specife pri instruado, kiuj povis vivi uzante la samajn gvidantojn kiel la tri-jara kurso. Sekve ILEI starigis en 2012 propran eblon por surloka trejnado, kiu okazos en Herzberg dum la konferenca tempo. ILEI en 2011 disponigis sumon por stipendioj por RITE, sed pro manko de laborfortoj, tiuj ne estis aljuĝitaj, kaj la sumo transiris al 2012, kie almenaŭ kelkaj stipendioj estis aljuĝitaj.

Kvankam en 2011 ni ja vidis agadon pri trejnado, la plimulto okazis pere de sekcioj de ILEI aŭ aliaj instancoj: E@I en SES, ISOA en Ĉinio, preleg- kaj kurs-vojaĝoj tra latinameriko, RITE por la reta trejnado, UAM por hibrida (reta plus surloka). Elpaŝo de ILEI lanĉita en 2012 provas kuntiri tiujn valorajn sed disajn iniciatojn en unu flekseblan unuon, kiu havus ŝancon gajni gradon de oficiala agnosko. Vidu apartan dokumenton pri tio.

Instruista trejnado estus tereno kiu impete antaŭenirus, se eĉ la duono de la imagoj pri ĝi en la Strategia Vizio de UEA povos realiĝi. Restas tasko de ILEI proksime sekvi la sorton de tiu Vizio,

aktive apogi ĝian realigon, kaj per tio havi la eblon movi la instruistan trejnadon al pli supra kaj pli serioza nivelo.

Juna amiko:

Aperis bonritme la tri numeroj de la jaro. Jarfine forlasis la redaktoran postenon Géza Kurucz, kaj tra la sekvaj ses monatoj, neniu anoncis sin aŭ akceptis la taskon transpreni tiun redaktadon, kiu rezultas en signifa bremsado ĉe ceteraj projektoj de la ligo. La unua numero de 2012/1 aperis kun dramece nova kovrilo, sed ni ankaŭ provas aliajn proponojn, por atingi definitivan kovril-aspekton. Ni stebus trovi tempon definitivigi la transigon de la presadon kaj ekspedo al Pollandio, sed konferencaj limdatoj malebligis progreson tiukampe. Timeblas la maleblo de la akurata livero de 2012/2, ĉar la ripetaj alvokoj por nova redaktoro, nova varba direktanto kaj reteja prizorganto ĉiuj ricevis nulan reagon.



Internacia Pedagogia Revuo:

Tio aperis akurate en bona kvalito, kun kvar numeroj rete kaj papere liveritaj. La tria numero kiel kutime aperigis abundan materialon pri la konferenco; la dua numero anticipe malfermis la temojn de la kongreso kaj la simpozio. Tra la jarkolekto aperis pli ol deko da fakaj artikoloj.

Koloraj kovriloj de IPR

2011/1	K1 kaj K4	Kopenhago – la konferencejo kaj apudeco.
2011/2	K1 K3 K4	Vintra Esperanto-Kurso (Ĉinio) Kongo DR + Estraroj de UEA kaj ILEI kune en Roterdamo. Indonezio: fotoj pri la prelegvojaĝo Heidi Goes.
2011/3	K1 kaj K3 K4	Kopenhago: konferenco kaj simpozio Kongo DR: seminario en Kinŝaso
2011/4	K1 K3 K4	Kongresejo kaj apudeco en Kunmingo Unua ILEI-Seminario de Orienta Azio (ISOA0, Ĉinio ISOA, Ĉinio kaj ILEI kaj UEA en Unesko (Parizo)
2012/1	K1 K3 K4	Kunmingo Somera Esperanto-Sesioj (SES), Nitra, Slovakio Insulo Hajnano + Preparkunsido por la kunminga konferenco
2012/2	K1 K3 K4	Hajnano – kurso ĉe la Esperanto-insulo UK en Bialistoko (lasta foto en IPR de Josef Semer) Kunmingo – prepara kurso KER-diplomitaj montras siajn diplomojn en Hajnano KER-diplomitoj faras same en Francio

Raporto de la estrarano pri landa kaj lerneja agado

- Sendado de instrumaterialoj al instruantoj de Ameriko partoprenintaj la Seminarion dum la ILEI-Konferenco okazinta en Havano.
- Kontaktoj ne tiel oftaj kun la komisionano pri lerneja agado
- Daŭra subteno al la laboro de la Kuba ILEI-Sekcio
- Gvidado de porinstruista kurso de februaro ĝis novembro kadre de Kuba Esperanto-Asocio

- Gvidado de ekspresa kurso en la ĉefurbo dum novembro
- Laboro kiel nacia estrarano de Kuba esperanto-Asocio
- Preparo de instruprogramo por gvidi kurson de la unua nivelo de Esperanto
- Preparo de instruprogramo por gvidi kaj dekduhoran kaj okhoran ekspresan kurson de Esperanto
- Preparo de la konkursaj ekzamenoj de KEA
- Laboro en la lernolibro de Esperanto por hispanparolantoj
- Prelego pri ILEI kaj aliaj instrutemoj kadre de naciaj kaj regionaj renkontiĝoj de Kuba Esperanto Asocio
- Daŭra kontakto kun la prezidanto kaj sekretario de ILEI.
- Preparo de laborplano por konkretigo de la projekto Esperanto 125 en Kubo kaj ekplenumo de projekto-taskoj.
- Preparo de kubaj ekzamenoj celante pretigi la kubajn esperantistojn por la ekzamenoj de ILEI kaj por tiuj de la Eŭropa Referenckadro.
- Prelego pri instrutemoj kaj gvidado de kunsidoj pri landa agado kaj lerneja agado kadre de la 44^a ILEI-Konferenco en Kopenhago.
- Gvidado de la programero Tago de la Lernejo dum la 96^a UK kaj prelego pri instrutemo.
- Gvidado de la Seminario *Flugiloj de Facila Vento* kune kun Radojica kaj Jozefo kadre de SES (Somera Esperanto Studado en julio 2011) en Nitra, Slovakio.

Pri 2011

Jen tre malkompleta prezento de okazintaĵoj el 2011. Kompletigo bonvena!

Tutjare:

Daŭrigo kun sama elano de la regula raportado en la liga retejo kaj tra retgrupoj

Intensigo de la retvoĉdonoj en la komitato de ILEI

Daŭrigo de financa subteno por UAM, RITE, aranĝoj en Afriko, ks.

Januare:

Komenco de Vintraj Esperanto-Kursoj en Ĉinio (IPR 2011/2, p 31)

Februare:

Eldono de la simpozia kajero el Parma, Italio el 2006.

Marte:

Etosplena kunveno en Kongo DR celebris la Tagon de la Virino (IPR 2011/2, p 37)

Aprile:

Starigo de rilatoj kun Kulturcentro Gresillon, kun ĉiujara printempa aranĝo de ILEI.

Seminario kun ekzamenoj en Rumonge, Burundo (IPR 2011/3, p. 32)

Didaktika seminario en Sestri Levante, Italio. (IPR 2011/3, p.35).

Pedagogia tago en Hungario (IPR 2011/2, p. 34)

Estrarkunsido de ILEI en Roterdamo paralele kun tio de UEA. Sukcesa iniciato, sed pro ekonomiaj konsideroj, ne ripetebla. (IPR 2011/2, p 38.)

Julio:

Aktiva partopreno de ILEI-anoj el diversaj kontinentoj en TAKE, Brazilo.

Senprecedence sukcesa universitata simpozio, kadre de la 44a konferenco.

Aŭgusto:

Somera Esperanto-kursaro de nia ĉina sekcio. (IPR 2011/2, p. 32)

Septembro:

Prelegvojaĝo kaj kursaro de Heidi Goes, tra Indonezio.

Oktobro:

ILEI sukcesis akiri rajton eniri la Ĝeneralan Konferenco de Unesko en Parizo, kaj kune kun la delegacio de UEA atingis belajn rezultojn. (IPR 2011/4, p 14.)

Torpedo 7, la ĉiujara kunveno de germanaj instruistoj, okazis en Herzbergo.

Novembre:

Hungara ILEI-sekcio en la nacia kongreso (IRR 2011/4, p 27)

Decembre:

Unua kunsido de ĈLEI – nia ĉina ILEI-sekcio. (IPR 2012/1, p 33)

2012

La sekva listo estas tiom malkompleta, ke ĝi fortiros vian spiron. Kompletigoj bonvenaj.

Maje: Starigo de kunlaboro kaj interkonsento inter ILEI kaj IFEF.

Maje: Starigo de kunlaboro inter ILEI kaj EEU.

Konkludaj pensoj:

La unua jarduono de 2012 pro pluraj kialoj montriĝis tre malfacila. La antaŭenirinta du-kaj-duonjara periodo vidis fortan intensigon de la agado, kaj malfermon de novaj planoj sur plej diversaj terenoj. Aliflanke, ni ne vidis respondan kreskon ĉe la membraro, nek ĉe la kvanto de internacie laborpretaj personoj. Sekve, la realigo de multaj planoj suferis prokraston aŭ forlason. Samkiale, ekvilibro de la buĝeto 2012 montriĝis senprecedence malfacila; por eĉ limigi la planatan deficiton de ILEI sub 5000 eŭroj, projektoj sur pluraj esencaj kampoj estis ĉesigitaj – neniuj eldona agado, neniuj varbiloj, redukto de honorarioj, nuligo de estrarkunsido, minimuma progreso ĉe la multlingva retejo, malpreteco de la kurso e125, malsukceso enpostenigi novan redaktoron por *Juna amiko*, ktp. ktp. La duobla bato de limigitaj financaj kaj laborfortaj rimedoj pezis forte sur la laboro, jam ekde la jarkomenco. La taskoj amasiĝas sur la ŝultrojn de ĉiam malpli da homoj, kun negativa efiko sur la liverkapablo de bonaj rezultoj.

Reage al tio, kaj por ne heredigi al la nova estraro tiom maloptimismajn perspektivojn, ILEI komence de julio skizis detale la deziratajn edukajn laborojn por 2013, kiel bazo por propono al UEA altigi ties disponigon por edukado (sub rubriko ‘movada evoluigo’) de €6000 ĝis 8000, tiel ke ILEI povu kalkuli je rimedoj ĝis €6000, kompare kun €4200 en 2012. La koncerna dokumento estas je dispono de niaj komitatanoj; la propono devos esti traktita de la Komitato en Hanojo. Intertempe montriĝas, ke estas esperoj, ke la pli realisma financo-nivelo estos solvebla ĉe la estrara-oficeja nivelo, kaj ke la enplektiĝo de la komitato de UEA eble ne necesos.

Tio estas tre ĝojiga, ĉar nur pere la aktiva engaĝigo de UEA kaj la tuta movado, la instruaj planoj havas veran perspektivon.